

Heinrich Heine,  
Milde fluas tra la kor'

*tradukita de Valentin Melnikov*

Milde fluas tra la kor'  
kanto primavera.  
Flugu, melodi-sonor',  
en la vast' aera.

Flugu longe, sen ripoz',  
super domoj flutu.  
Se troviĝos tie roz' –  
ĝin de mi salut.

*Traduko de la Germana poemo "Frühlingsbotschaft" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de Valentin Melnikov.*

*Arg-527-1044 (2010-03-15 17:53:18)*

*Tiu ĉi poem-esperantigo estas - kun permeso de s-ro Valentin Melnikov - prenita el ties reta kolekto <http://www.esperanto-mv.pp.ru/Melnikov>. Vidu: <http://www.esperanto-mv.pp.ru/Melnikov/Heine.html>. Vidu ankaŭ: <http://www.esperanto-mv.ru/Melnikov/index.html>.*

Heinrich Heine,  
Softe vibras tra l'anim'

*tradukita de Kálmán Kalocsay*

Softe vibras tra l'anim'  
melodi' tenera,  
flugu al la malproksim',  
kanto primavera!

Flugu al florbeda dom',  
kaj se tie ĉarme  
ridos roz', en mia nom'  
ŝin salut.

*Traduko de la Germana poemo "Frühlingsbotschaft" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de KÁLMÁN KALOCSAY (Kalmano Kaloĉajo, \*1911 – †1976).*

*Arg-527-1088 (2010-05-27 11:29:19)*

*El la poezia volumo "Kanzonoj de Heine".*

Heinrich Heine,  
Printempa saluto

*tradukita de Ludwig Emil Meier*

Iras ĉarma sonoret'  
Tra de mi animon.  
Sonu printemo kantet'  
En la malproksimon!

Ĝis la dom' forsonu vi,  
Kie floroj pendas!  
Diru al la roz', ke mi  
Saluteton sendas.

*Traduko de la Germana poemo "Frühlingsbotschaft" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de LUDWIG EMIL MEIER (\*1847-02-16 – †1919) en 1908.*

*Arg-527-1045 (2010-03-14 15:53:26)*

*Tiu ĉi esperantigo de la poemo estas vere iom fuŝe tradukita. Ĝi aperis en programo de koncerto el la jaro 1908 (laŭ informo de la dana s-ano Lars Kromann [[lars.kromann@mail.dk](mailto:lars.kromann@mail.dk)]). Pri Ludwig Emil Meier rigardu ankaŭ la vikipedian retejon [http://eo.wikipedia.org/wiki/Ludwig\\_Emil\\_Meier](http://eo.wikipedia.org/wiki/Ludwig_Emil_Meier). Li verkis interalie la kant-libreton "Esperantista Kantaro", kiu aperis en 1907 ĉe la Esperanta eldonejo de Hans Theodor Hoffmann en Berlino.*